

# KROATA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KROATA ESPERANTISTA UNUIĜO

DUMONATA



GAZETO

Prezo de ĉi utu  
numero estas  
100 HRD aŭ 2 guldenoj

Jarabono  
600 HRD aŭ  
12 guldenoj

Redakcio:  
Trg burze 2  
ZAGREB

ZAGREB, 10. APRILO 1909. UNU NUMERO KOSTAS 25 HELEROJN. UNUA JARO — NO. 1

## KROATA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA „DRUŝTVO HRVATSKIH ESPERANTISTA.“

MONATA



GAZETO.

La »Kroata Esperantisto«  
aperas la 15<sup>an</sup> de ĉiu monato.

**Abono:**

1 jaro (12 numeroj) K 3.--  
1/2 » (6 numeroj) K 1.50  
Por unuiganoj jara abono K 2.--

**Redakcio kaj Administracio:**  
Trg Franje Josipa br. 19.

Redaktorino: Danica de Bedeković.

**Reklamo:**

1 paĝo K 25 1/4 paĝo K 7  
1/3 » » 13 1/6 » » 4  
kun unufoja apero.  
Por 7-12 anoncoj 25% rabato.  
Po linioj laŭ interkonsento.

MIA ŜIPO.

De Petro Preradović.

Naĝu, naĝu ŝipo mia  
Pelu for la rem,  
Ne estante celo ia  
Donu ĝin vi mem.

Tien ĉi vin alportante  
La favora fort',  
Velstreĉante, rembatante  
Portu vin la sort'.

Al la vento nun konfidu,  
Al la ondkurad' -  
En estonton belan gvidu  
Vin la vojaĝad'!

El la lingvo kroata esperantigis: *Mavro Špicar.*

SALUTO.

POZDRAV:

S ovim brojem našega društvenog glasila stupamo na polje aktivnoga vidjivog rada, svijesni, da naš list imade veliku zadaću i tešku dužnost. Isti treba da u jednu ruku širi Esperanto u Hrvat-skoj, u drugu pak ruku treba da našu bogatu ali slabo poznatu književnost uvode u »Esperantiju«, u tajnstvenu zemlju, koja se ne nalazi niti na mje-secu, niti u svemiru, već u srcima svih Esperantista i u njihovim dušama.

Kakogod se je prije dvije tisuće-go-ina na nebu pojavila zvijezda, te čo-ječanstvo vodila u novu epohu: baš

Per tiu ĉi numero de nia unuigor-gano ni marŝas sur la kampon de ak-tiva, videbla agemo, konscie, ke nia gazeto havas grandegan taskon kaj gra-vegan devon. Unuflanke ĝi devas dis-vastigi Esperanton en Kroatujo, aliflanke enkonduki nian riĉan de malmulte kona-tan literaturon en Esperantujojn, en tiun misteran landon, kiu ekzistas nek sur la luno, nek en la universo, sed en la koroj de ĉiuj Esperantistoj kaj en iliaj animoj.

Kiel antaŭ du miljaroj la stelo ape-ris sur la ĉielo, kaj gvidis la homaron en novan epokon: tiel same ankaŭ nia

## " KROATA ESPERANTISTO "

izdavaĉ i osnivaĉ

eldonisto kaj fondinto

HRVATSKI ESPERANTSKI SAVEZ  
KROATA ESPERANTISTA UNUIĜO  
ZAGREB, TRG BURZE 2

urednik / redaktoro  
Marija BELOŠEVIĆ

izlazi dvomjeseĉno  
aperas ĉiun duan monaton

Za sadrĵaj ĉlanaka odgovaraju sami autori.  
Pri ĉiuj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Tisak / Presejo  
" More "

Preradoviĉeva 7/I  
Zagreb

tiskano / presita  
1992.07.18.

cijena ovog broja / prezo de ĉi tiu numero  
100 HRD aŭ 2 guldenoj ( eksterlando )

godiŝnja pretplata / jarabono  
600 HRD aŭ 12 guldenoj ( eksterlando )

Ĉlanovi Maloga vijeća HES / Estraro de KEU

- Radenko Milošević, predsjudnik/ prezidanto
- Marija Belošević, tajnik / sekretario
- Ivan Bekavac - Basić, potpredsjudnik / vicprezidanto
- Sandra Gabrilo, potpredsjudnik / vicprezidanto
- Zdenka Svetličić, potpredsjudnik / vicprezidanto
- Franjo Šlabek, potpredsjudnik / vicprezidanto

## DUAN FOJON EN UNU JARCENTO

Oni ofte diras, ke io povas okazi nur unu foje en la monato, jaro, jardeko, kaj fine jardeko. Sed, kiam io okazas po duan fojon en iu de menciitaj tempo periodoj, oni ofte parolas pri la miraklo.

Sed ni ne deziras, ke tio kion faris ni oni nomu kun iu ajn stranga aŭ eksterordinara nomo, ĉar faktoj estas ja faktoj, ĉu ne?

Do, ke ni ne plu parolu pri io kaj ke vi ne sciu, ni tuj malkovras, tion vi ĝuste nun entanas manojn, jes temas pri la oficiala organo de Kroata Esperantista Unuiĝo simple nomita "KROATA ESPERANTISTO".

Bedaŭrinde, inter ni ne estas multaj kiuj preparis samnomitan gazeton je la komenco de ĉi jarcento, aŭ pli precize en la jaro 1909. Ni ĉi tie mallonge priskribu eventojn ligitajn al tio.

La unua numero de la unua E - gazeto en Kroatio aperis la 10-an de aprilo 1909 en Zagreb, kiel organo de la Unuiĝo de kroataj esperantistoj.

Ĝin redaktis Danica nbl. Bedeković kaj la redaktejo estis sur la tiama Placo de Franjo Josip 19 ( 80 jarojn poste ĉe la sama domo Zagreba Esperanto - Ligo malkovris la memortabulon ).

Kaj kiel ĉiam, bona voĉo traflugas la mondon, tiel jam la 14-an de aprilo la redakcio ricevis kuraĝigan salutleteron de d-ro Zamenhof, jen la teksto: " Varsovio, 14/IV 1909. Al la redakcio de la " Kroata Esperantisto " mi sendas mian koran dankon por la unua numero de la kroata gazeto, kiun mi ricevis kun plezuro. Mi deziras al Via organo plej bonan sukceson kaj ĉiam pli kreskantan forton kaj gravecon. Via D-ro Zamenhof ".

Bedaŭrinde, pro multaj kialoj, la gazeto ne aperadis longe. Kaj jen, post iom pli ol 80 jaroj ĝi reaparis kiel oficiala organo de unu E - Unuiĝo.

Ni alvokas ĉiujn kiuj eble iam ricevis iun numeron de tiama "Kroata Esperantisto" aŭ simple ie ajn trovis ian mencion pri ĝi. Nepre kontaktu nin, car ni tre volonte aperigos tion. Antaŭan dankon.

Kvankam, la gazeto estas oficiala organo de Kroata Esperantista Unuiĝo, vi vidas ke enhave ĝi estas tre malfermita al la mondo. Tial, se vi deziras, simple sendu la kontrubuaĵojn al nia adreso. Do, tamen atendu, la gazeto aperados ĉiun duan monaton, por ke ni ne devus nuligi vian kontribuaĵon pro la tempo - paso.

Do, kune al la pli bona estonteco kun unu nova gazeto !

Marija Belošević

## ENHAVO

● Duan fojon en unu jarcento . . . . .	2	● Radio – Zagreb, Esperanto – fake, ekumutis (E. Lapenna) . . . . .	7
● Bomboj kontraŭ infanaro, ĉu eblas (M. Belošević) . . . . .	3	● Literaturo: "La sorĉistino de Griĉ" (V. Lukež) . . . . .	8
● Al Ŝibenik (M. Karagić) . . . . .	3	● Pedagogia paĝo . . . . .	9
● Intervjuo . . . . .	4	● Etula angulo . . . . .	9
● Militaj domaĝoj ĉe la kroataj fervojoj (F. Šlabek) . . . . .	5	● Junulara mondo . . . . .	10
● Kialoj por fondiĝo de la Kroata Esperantista Unuiĝo (R. Milošević) . . . . .	6	● Amuzaĵoj . . . . .	10
● Kiel planite, dirite, laborante – antaŭen! . . . . .	6	● Anoncoj . . . . .	11
		● Kroatio – nova membre de OUN . . . . .	12

Redonu rideton al ĉiu infanvizaĝo

## BOMBOJ KONTRAŬ INFANARO, ĈU EBLAS?

Pli ol unu jaro ni rigardas malfeliĉajn infanvizaĝojn el Kroatio, lasttempe same el Bosnio kaj Hercegovino. Ĉu vere mondo estas senhelpa, aŭ sono de bombo devas anstataŭigi endormiĝan voĉon por jam naskita bebo, ĉar la patrino mortis?

En iu alia milito, ĝi ne elektus la viktimojn, sed eĉ tiu okazata sur nia terspaco eĉ tion eblas, se ne, kiel maniere klarigi forsenditan granaton al la infangrupeto, kiu pro la infana scivolemo deziris trovi kelkajn ĉerizojn en Sarajevo. Multaj inter ili ne plu vivas, pro la scivolemo aŭ io alia?

Alia tre bona ekzemplo estas antaŭ ne longe finita Internacia infanfestivalo en Ŝibenik. Jam dudeko da jaroj, infanoj el la tuta mondo kunvenis ĉe la sibenika katedralo, loko kiun oni plenrajte povas nomi tutmonda infana scenejo. Tiu urbo kaj la infanoj kunvenadis tien ĉi, ne demandinte kiu kaj de kie iu estas, simple dezirinte, kiel nur infanoj povas deziri pacon, pacon por la tuta mondo.

Kiel multajn jarojn antaŭe, same en Ŝibenik ĉi jare venis aktoroj el la tre foraj landoj, ĉar ili decidis same kiel la organizantoj ni devas kontraŭstari bombojn. Ilia decido haltigis bombojn nur unuan tagon, dum la solena malfermo. Ĉar bombo "bonvenigis" matenon al ĉiuj dormantoj antaŭ la domo kien oni vespere kunvenis, kaj imagu se ĝi estis veninta nur kelkajn horojn antaŭe!

Sed la organizantoj kaj aktoroj ricevis infanan optimismon kaj obstine decidis antaŭen!: in-

fanekspozicioj en iaj nekonataj koridoroj, ludeloj en malgrandaj keloj, prezentaĵoj en nekonvenaj ejoj. Festivalo kaj la infanoj tamen ne permesis al la bomboj rompi kelkajn feliĉajn momentojn.

Ĉiuj kiuj ne povis ĉi jare viziti la festivalon bedaŭras, sed same feliĉas ke la detruita, historia urbo montris ke estas vivanta, kiel multaj aliaj urboj tra Kroatio.

La festivalo almenau por la momento redonis rideton al sibenikaj infanoj. Decidu ni unuope, ke ĝis la fino de la jaro ni redonos almenaŭ unu infanan rideton, ne por la momento, sed por ĉiam!

Marija Belošević

Mijo Karagić

## AL ŜIBENIK

Serĉi vivradikojn, ho estinto fama!  
Vagi en ombro de blanka ŝtono varma,  
fontanoj, figoj kaj konturo palma  
kun muroj oldaj gardistoj super templo kroata.

Fiera katedralo kaj Santana burgo,  
longe nokte promenadas senzorgaj vagantoj  
odoras rave ŝibenikaj plantoj  
inter kiuj jar centaj dalmataj kantoj vivas.

Spursekvi estinton faman,  
ŝipeton lasi en haveno olda  
kaj ĝisatendi saluton de sonmuziko surborda.

Nuntempo kvazaŭ vundita, sanga ŝtono  
stumblas minace, timigas kaj doloras ene  
kaj tiel la fiera estinto fariĝas kripla plene.

Tradukis: Emilija Lapenna



Foto el la arkivo de la KRK

## INTERVJUO

kun la sekretario de la Kroata Ruĝa Kruco (K RK) dr-o Nenad JAVORNIK.

K.E. Bonvolu koncize prezenti Kroatan Ruĝan Krucon hodiaŭ

Javornik: Antaŭ ne longe ni proklamis novan Statuton de la organizo, per kiu ni plenumas ĉiujn postulojn por membri en la du internaciaj organizaĵoj: Federacio de la societoj de Ruĝa kruco kaj Ruĝa duonluno, kiuj havas sidejojn en Ĝenevo.

Same, la kroata registaro subskribis ĉiujn necesajn dokumentojn, kaj ni baldaŭ atendas akcepton de la Organizo internacienivele.

Sed malgraŭ tiu ankoraŭ ne formala agnosko, ni tre bone kunlaboras kun la Internacia R K, kaj ni praktike eĉ ne vidas diferencon inter nia kaj iu alia nacia Societo de la R K.

Ni havas tre bonajn bilaterajn ligojn kun multaj naciaj organizaĵoj el Germanio, pli precize Bavario, Aŭstrio, aparte menciinda Tirolo kaj Stirio, Italio, kaj aliaj. Ni estas tre feliĉaj pro la granda kompreno.

K.E. Ĉe ni oni ankoraŭ militas. Milito nun trapasis la limon. Multaj, homoj devintaj forlasi siajn domojn, ofte disigitaj de siaj familianoj, soldatoj kaptitaj de la malamika parto ankoraŭ ne revenis. Tamen, via serĉad - servo bone funkcias.

Javornik: Unu de la tradiciaj servoj de la Internacia R K estas tiel nomata serĉad - servo, kies sidejo estas Ĝenevo. Ĉiu nacia societo de la R K havas sian samnomatan servon. Ĝi funkcias kaj dum la paco kaj la milito. Pli da atenton oni donas, dum la militaj periodoj, kiam okazas grandaj migradoj de la loĝantaro.

Vi ja scias ke pli ol 700.000 da loĝantoj de Kroatio ne plu vivas en siaj propraj domoj, pli ol 200.000 domoj kaj loĝejoj estas averigitaj, kaj pli ol 50.000 entute detruitaj. Iuj jam komencis revenadi al siajn loĝlokojn, tamen multaj estas dise tra Kroatio, aŭ eksterlande ( en apuda Hungario pli ol 400.000 Kroatoj atendas la reventempon ).

Granda katastrofo nun trapasis la landlimon, amaso da rifuĝantoj ĉiu tage envenadas el Bosnio kaj Hercegovino. Tiu numero baldaŭ atingos vere kritikan limon. Nia organizaĵo kunlaboras kun la Registaro kaj aliaj humanitaraj organizaĵoj en la Respubliko. Same ni estas kolektivaj membroj de la Registara oficejo por la rifuĝantoj.



Fotoj el la arkivo de la K RK



Serĉadi malaperintajn personojn estas vere malfacila kaj tre serioza okupo. Mi devas menci, ke ĉe la komenco ni havis problemojn, sed ni sukcesis starigi unu bone funkciatan reton, ĉar oni devas prilabori multajn informojn, tial ni ĉion komputiligis, kaj tiel maniere pli malmulte da homoj kaj pli efika sistemo.

Ĝis nun oni ekkomencis serĉadon por pli ol 30.000 malaperintojn. Vi povas imagi, ke temas pri vere granda kaj burokrata laboro. Ni ofte devas peti paciencon kaj komprenon. Mi devas menci, ke la serĉad - servo de la dua mondmilito ankoraŭ ne finis sian laboron, lastajn petojn oni forlasos en la 2000 jaro.

K.E. En via organizaĵo aktivas volontuloj, kion planas R K por la estonteco?

Javornik: En ĉi tiu momento en Kroatio funkcias multaj organizaĵoj, tamen la plej malnova kaj la plej bone organizita estas la nia. Multaj volontuloj laboras en K RK, sed same en aliaj organizaĵoj ( Caritas, k.a. ).

En la estonteco, ni devus pli da atenton doni al la apartaj grupoj kiuj realigos diversajn humanitarajn programojn. Mi unuavice pensas pri la junularo, ni devos organizi nin, kaj oferti al ili diversajn programojn kiuj helpas al ili pli sanige vivi, helpi al aliajn, batali kontraŭ ĉiujn malbonaĵojn faritajn de la homa mano. Tamen, mi pensas, ke por tiajn programojn devas veni pli paca tempo.

K.E. Je la komenco vi menciis bonan kunlaboron kun alilandaj societoj de la R K, Vi ofte al ili devas klarigi kio fakte okazas ĉi tie.

Javornik: Homoj el Eŭropo kaj Ameriko simple ne ofte povas kompreni kialojn de la milito, ni provadas ĉiam klarigi tion al ili, ke ne temas pri la batalo inter du popolojn, sed ke temas pri la batalo inter du diversajn pensmanierojn, praktike batalo inter du diversajn kulturojn kun diversaj historiaj spertoj. Kaj fine ĉiuj ekvidas simplan verecon, ke ĉio kio okazis sur la teritorio de la respubliko Kroatio, ne estas kaŭzata de ia ajn agmaniero de iu kroato. Kroatoj ĉiam provis trovi kiel pli humanajn kaj homecajn vojojn por organizi defendadon de sia ŝtato kaj sia posedaĵo, neniam preninte de ies.

Post tian vortojn, la mondo ekkomprenas kaj helpas. Kaj finfine dividas viktimojn de la agresoroj.

Intervjuis:

Marija Beloŝević

## MILITAJ DOMAĜOJ ĈE LA KROATAJ FERVOJOJ

Oni kutime sciigas pri sukcesoj kaj pozitivaj novaĝoj ĉe fervojoj, sed en Respubliko Kroatio nenia atingiĝo kaj progreso ĉe fervojoj estas notebla - oni devas paroli pri terura detruo kaj granda retroiro de unu parto de eŭropa fervojreto.

La atako kontraŭ Kroatio fare de t.n. Jugoslavia popolarmeo kaj ribelintaj serboj daŭranta de la majo 1991 ĝis nun kaŭzis multegajn suferojn kaj neripareblajn domaĝojn.

Neanstataŭeblaj estas pereintaj homaj vivoj kaj kripligitaj homoj. Nun ŝajnas neimageble starigi rompitaĵajn ligojn inter homoj kaj tio estas la plej grava domaĝo de tiu kruela kaj malpura milito.

La atakantoj same sisteme detruigadis materiaj valoroj: entreprenojn, domojn, hospitalojn, agrikulturon, k.s., sed specife neniigadis kulturajn valorojn - preĝejojn, monumentojn, historiajn urbojn ( Dubrovnik, Vukovar, Zadar, Ŝibenik, Osijek kaj multajn aliajn ), eĉ monde konatajn kaj de la UNESCO protektitajn natur-belaĵojn ( la lagoj de Plitvice, kanjono de rivero Krka ).

Krom homaj perdoj ĉe la Kroataj fervojoj - pli ol cent fervojistoj pereintaj, pli ol 500 grave vunditaj - infrastrukturaj fervojaj objektoj estas grave difektitaj pro la graveco kiun fervojo ĝenerale havas en la ekonomio de la lando.

- estas detruitaj, difektitaj aŭ blikitaj multnombraj signalaj kaj telekomunikaj instalaĵoj, aparatoj kaj trakciaj mekanismoj, stacidomoj kaj aliaj fervojaj objektoj,

- serioza perdo estas ĉe lokomotivoj kaj vagonoj kiuj kune kun la multekosta varo estas detruitaj aŭ rabitaj.

Kvankam la nombroj estas enuigaj, jen kelkajn:


difektitaj grave aŭ tute detruitaj estas 24 pontoj, 11 stacidomoj kaj 207 aliaj fervojaj objektoj, 6 dizeltraĵoj, 35 elektrotraĵoj, 29 lokomotivoj kaj 427 vagonoj. Krom tio 1150 vagonoj kaj 52 lokomotivoj estas blokitaŭ au forabitaj.

Tutan domaĝon ĉe la kroataj fervojoj oni kalkulas je unu miliardo da dolaroj, dum la tutan militan domaĝon en Kroatio oni aprezas je 20 miliardojn da dolaroj.

La vartransporto sumas je 60 procentoj de antaŭmilita. Sed, oni devas akcenti ke magistrala linio Botovo ( hungara landlimo ) - Zagreb - Rijeka seninterrompe funkcias kaj estas speciale gardata. Same linioj al Osijek kaj Vinkovci eltenis ĉiujn militeventojn kaj daŭre funkciis dum la milito.

Krom kun Slovenio kaj pluen en Eŭropo, ekzistis ligo kun Bosnio kaj Hercegovino ( Slavonski Šabac - Bosanski Šabac kaj tra Sarajevo ĝis Ploče ), sed disvolviganta milito en tiu ŝtato ne plu ebligas fervojan ligan.

Kun la espero al daŭra paco, la Kroatajn fervojojn atendas malfacila vojo al renovigo de detruitaj kaj domaĝitaj objektoj. Oni kalkulas, ke necesos minimume kvin jarojn por ke la fervojo estu je



Jen la resuma trarigardo de la plej gravaj domaĝoj ĉe la Kroataj fervojoj:

- kvankam oni kalkulas ke kvarono de Kroatia ŝtata teritorio estas okupita, pli ol unu triono de fervojreto kroata ne funkcias. La fervojreto ampleksas 2592 km kaj 875 km estas ekster ekspluado - 460 km estas detruitaj aŭ grave domaĝitaj kaj sur 415 km la fervojtrafiko funkcias kun grandegaj malfacilaĵoj kaj sporade,

- magistrala fervojlinio Zagreb - Beograd estas rompita duloke ĉe stacioj Okučani kaj Tovarnik, kaj okupita grava fervojlinio Knin malebligas trafikon al dalmatiaj havenoj - Split, Ŝibenik kaj Zadar,

sama nivelo kiel antaŭmilita.

Sed tamen la Kroataj fervojoj ligiĝas kun Eŭropo enkondukinte novajn EC kaj IC trajnojn - al Munkeno, Vieno, Budapeŝto kaj Venecio.

Franjo Ŝlabek

Red. Ĉi supra teksto estas resumo de la prelego prezentita dum la lasta IFEF - kongreso en Germanio.

## KIALOJ POR FONDIGO DE KROATA ESPERANTISTA UNUIĜO

Estis kelkaj kialoj, ke grupo da patrolandamantoj esperantistaj decidis organizi KROATAN ESPERANTISTAN UNUIĜON, kiu per sia agado kaj aktivado daŭrigos glorajn antaŭulojn geesperantistojn s-inon Danica nbl. Bedeković kaj s-ro Mavro Špicer. Alprosimiĝis jubileo jarcenta, kiam d-ro Tomo Maretić legis ĉe solena kunsido de tiama Jugoslavia akademio de scienco kaj arto la 10-an de decembro 1891, sian verkon "Pensoj pri artefarita monda lingvo". Krom tio nia Patrolando armile, kore, labore, pense kaj vorte batalegis, ke ĝi post preskaŭ naŭcentjara subskribo de la ĉarto "Pacta conventa" en la jaro 1102, denove sed nun sen ia ajn kunŝtataneco memstare eliru al scenejo de Eŭropo kaj mondo, kiel reprezentanto de unu malgranda, sed unu inter la plej malnovaj popoloj de Okcidenta mondo.

Esperantista organizo de Kroatio jam longlonge laciĝis membre kaj labore kaj organize, ne anoncinte sin kontraŭ neagado kaj neordo. Kaj al tio alvenis nepripensoj pri popola kaj nacia situacio, kiam niaj homoj - gejunuloj, maljunuloj, civitanoj kaj soldatoj pereas vivojn kaj sangon verŝas kaj kulturaj, sciencaj, preĝejoj centjaraj konstruaĵoj estis detruitaj. Nenia voĉo al Eŭropo kaj al la Mondo, nek homaranisma nek nacia kontraŭ okazaĵoj kaj eventoj. Tia E - organizaĵo dum monatoj nekunvenigis, ne donis voĉon pri teruta situacio en Kroatio.

Nur fajrero el Zagreba Esperanto - Ligo vorte, letere kaj preleginte ĉe e-kongresoj kaj kunvenoj elradiadis terurajn novaĵojn pri Patrolando. Eĉ niaj amikaj samideanoj el amikaj kaj ĝemelaj urboj anoncis kaj eĉ organizis kolektadon de necesajoj por Kroatio. Agademuloj esperantistaj kaj patrolandantoj post ekscio ke laŭstatute KEL ne povas antaŭenigi laboron, kaj pro militaj kialoj ĝi ne havos eblecon kunveni, kaj post ekscio ke oni ne scias kial la pinta parto de organizaĵo eĉ ne kontraŭstaris atakon leteran celintan al la Respubliko kaj al Prezidanto mem, decidis labori solaj kiel oni diras obstine antaŭen!

Eble tia decido ŝajnas al iuj nebona aŭ eĉ malbona, ĉar almenaŭ laŭ nomo se ne laŭ laboro ekzistas ia e- organizaĵo en Kroatio, sed... Ni kredas, ke ni kun helpo Dia, kontraŭ milito kaj ĉio por komuna esperantista kaj domamanta afero progresos. Kaj post disiĝo de nuboj militaj, kiam aperigos suno de libereco kaj sendependeco, laboru kaj progresu ĉiuj esperantistoj kaj homoj,

ĉar por ĉiu ekzistas loko  
en esperantisma kaj homaranisma ĝardeno !

Kroata Esperantista Unuiĝo havis la fondkunvenon okazintan la 14-an de decembro 1991 en Zagreb, okaze Zamenhofa tago, kie ĝiaj membroj akceptis kaj proklamis STATUTON de Kroata Esperantista Unuiĝo - 1909. Kroata Esperantista Unuiĝo estis proklamita kiel socia kaj neŭtrala organizaĵo, kies celoj estas progresigi ideojn de la Unuiĝo de kroatiaj esperantistoj, fonditan la 2-an de januaro 1909 kaj gloran komencon de la unua Esperanto - klubo en Zagreb, fonditan pli frue la 28-an de decembro 1908 en Zagreb.

La celo de la Unuiĝo estas kunigi esperantistojn kaj inkludi ilin en internacian esperantan movadon, klarigante signifon kaj ideon de la internacia lingvo, utiligante ĝin en interŝanĝo de spiritaĵoj kaj materiaĵoj bonaj inter unuopuloj, popoloj, ŝtatoj kaj nepolitikaj internaciaj organizaĵoj.

Celoj kaj taskoj de la Unuiĝo estas: (1) disvastigi lernadon kaj aplikadon de la internacia lingvo Esperanto, (2) evoluigi inter membroj senton pri akcepto, kompreno kaj estimo de ĉiuj kulturoj, lingvoj kaj kutimoj, (3) enkonduko en internaciaj rilatoj - ekonomiaj, juraj diplomaciaj, en lernejoj, speciale eŭropa - internacian lingvon - Esperanton, (4) eldona kaj traduka agado per publikigo de libroj, revuojn, sonaj kaj fotofilmaĵoj propagandaj registraĵoj, (5) organizado de lingva instruado en ĉiuj medioj, (6) organizado de apartaj turismaj kaj informaj servoj por membraro, (7) organizado de kursoj, someraj

lernejoj, renkontiĝoj kaj ceteraj agadoj celantaj konigi Esperanton.

Ĉiuj kiuj deziras labori por Esperanto kaj per Esperanto por la Patrolando, por homaj rajtoj, por lingva egaleco, por progresigi Esperanto - movadon estas bonvenaj. Kaj ke ni opinias serioze - pruvas nia ĝisnuna laboro! Anoncu vi vian poresperantisman laboremon, kaj

Venu, vidu, konkeru

vian antaŭjuĝon ke ni ne volas kunlabori!

Radenko Milošević,  
Prezidanto de KEU

KROATA ESPERANTISTA UNUIĜO dum la lasta periodo

## KIEL PLANITE, DIRITE, LABORANTE OBSTINE ANTAŬEN!

Kialoj por la fondiĝo de Kroata Esperantista Unuiĝo vi jam certe tralegis. Do, jen la dua punkto, kion fakte Kroata Esperantista Unuiĝo aŭ pli simple KEU faris dum la pasintajn kelkajn monatojn.

Mallonge, agado estas ena kaj ekstera. Tio signifas, ke oni devas kolekti membrojn, propagandi la organizon, aŭ pli simple dirite fortigi ĝin. Certa parto sukcesis. Oni fondis junularan sekcion kaj pedagogian, survoje estas tradukanta kaj literatura. La plej nombra kolektiva membro - Kroata Fervojista Societo inter tempe estis akceptita en IFEF, do jen unua oficiala rekono same de KEU! Ni esperu, ke baldaŭ venos aliaj!

En Zagrebo oni fondis novan societon "Ban Jelačić", la plej multo junaj membroj.

Informkampe, oni ĝis la fino preparis diversajn kontribuadojn por la E - elsendo de la Kroata radio. Same oni preparis kelkajn nacilingvajn informojn por la gazetoj. Informiloj pri la agado estis forsendita al E - mondo.

Eldonkampe, ĵus finita poemkolekto de Kroatoj vivantaj en Hungario. La kolekto aperos aŭtune, kaj estos dulingva. Nun en la presejo estas vortlisto de "Gerda malaperis" kiu komence de la septembro estos preta por la kursoj kune kun la samtitola romano. Edukkampe, ni prilaboris programon por Esperanto en bazlernejoj, kaj ni esperas ke ĝi funkcios de la venonta lernojaro. Ni kontaktis kelkajn bibliotekojn, kaj de nun ni organizas en unu programon nomitan "En la ludo iom da Esperanto".

Apartan atenton oni donis al la internacia kunlaboro, kiu almenaŭ por la komenco estas tre abunda. Krom ke oni partoprenas diversajn E - aranĝojn, dum ili oni laboras.

Dank' al tio, vi povas aboni kelkajn E - gazetojn, kaj de la aŭtuno vi povos elekti ion el la Libroservo. Grave same, ke KEU estas landa organizanto de Pasporta servo.

De la aŭtuno ekfunkcios E - biblioteko kaj aldoninte reto de la E - bibliotekoj en Kroatio.

Do, ni ne malkovru ĉion. Ĉar se vi deziras ekscii iom pli kaj esti membro de KEU, estos pli simpla vojo ke vi skribu al ni. Tre bonvenaj proponoj por la jaro 1993!

Ni bonvenigas vin !

Malgranda Konsilantaro de

Kroata Esperantista Unuiĝo

## RADIO - ZAGREB, ESPERANTO - FAKO, EKMUTIS.

La esperantaj elsendoj en kadro de la unua programo de Radio - Zagreb, komenciĝis en aprilo



1953. En julio la saman jaron okazis en Zagreb la Universala Kongreso de Esperanto, la unua okazinta en la sudeŭropa regiono - Balkano. Esperantaj elsendoj informadis esperantistojn en- kaj eksterlandajn pri preparlaboroj por la kongreso, ne forgesante prezenti logaĵojn de

Zagreb, Kroatio. Tiam, en 1953, neniu ideon havis ke 39 jarojn pli poste, en 1992, ne plu estos en la komenca anonco menciita Radio - Zagreb, sed Kroata-radio, studio Zagreb. Ankaŭ tiam, neniu povis supozi ke esperantaj elsendoj post 39 - jara seninterrompa daŭro, estos nuligitaj sen en unuvorta skriba deklaro. Sen argumento, sen ia sciigo al la kolektivo, kiu preparadis ilin. Preskaŭ 4 - jardeka daŭro okazis sen iu forresto, sen malfruiĝoj, konstante ĝustatempa eĉ dum bombardado de Zagreb. La lasta elsendo estis la 28-an de junio. Post tio esperanta vorto sur ondolongoj de Kroata radio ekmutis.

Dum la forflugintaj 39 jaroj, elsenditaj estis pli ol 25 mil minutoj da programoj laŭte trailegitaj sur kelkmil tajpitaj folioj. Radio - artikoloj tradukitaj kaj originale verkitaj. Raportaĵoj foruzis cenmetran sonbendan longon. En lastaj 25 jaroj ĉiam komenco de la elsendoj estis novaĵoj, antaŭe el Jugoslavio, lastjare el Kroatio. Pere de ili eksterlandaj aŭskultantoj, ĉiam pli multaj ol enlandaj, eksciis ĉefajn sciindaĵojn pri la politikaj kaj sociaj cirkonstacoj en Kroatio. Ankaŭ en la lasta tragika, milita tempo en Kroatio, esperantaj vortoj informadis pri la vera stato de la suferantaj landoj Kroatio kaj Bosnio - Hercegovino.

La redakcio de la elsendoj en la leteroj ricevis, apud pluraj sufestoj kaj konsiloj, ankaŭ komplimentojn pro la bona lingvo, klara, senriproĉa elparolo. Ne mirige, la parolistoj estis profesiaj aktoroj gesinjoroj Vida Jerman kaj Julije Perlaki. Multaj aŭskultantoj esprimis bedaŭron pro tro mallonda daŭro de la elsendoj, nur 15 - minuta. Pro tio multaj publikaĵoj kaj revuoj ne povis esti regule observitaj en la konstanta programero " Observo pri la ricevitaj en- kaj eksterlandaj gazetoj ".

Tiu elsendo aparte plaĉis al niaj aŭskultantoj el tiel nomataj " nepagipovaj " landoj. Ne povinte aboni gazetojn, ili volonte aŭskultadis prezenton pri ili. Redakcio ricevadis kvin ĝis dekoble pli da postaĵo, ol povis esti menciita en tro mallonge daŭrintaj elsendoj.

Nun kiam niaj aŭskultantoj ne plu povos aŭskultian programon, dankon al ĉiuj, kiuj subtenis per kuraĝigaj vortoj esperantajn elsendojn de Kroata radio.

En la adiaŭa artikolo iom amara penso trudas rimarkon: Radio - direktoj ne povus tiel senargumemente kaj subite nuligi esperantan programon, se esperantistoj estus montrintaj pli grandan intereson por tiu aktivado. Tio mankas. Nur deko da stacioj elsendantaj esperantan programon, vere ne povas imponi. Nenia kampanjo iam okazis por plibonigi tion. Nenia serioze akcentita rezolucio, kiu rekomendus vastigon de esperantaj elsendoj. Multaj esperantistoj simple ne komprenas gravecon de tiu aktivado. La sekvo de tio estas nuligita esperanta vorto en Kroata radio.

Emilija Lapenna

ligita al esperantaj elsendoj de  
Radio - Zagreb de 1953 ĝis 1992.



## LITERATURO

Laŭ la romano de la aŭtorino Marija Juriĉ - Zagorka, honore al la 900 - jariĝo de la urbo Zagreb, rerakontis kaj esperantigis Velimir Lukež.

Marija Juriĉ Zagorka

### " La sorĉistino de Griĉ " historia romano ANTAŬPAROLO

Furioze persekutado de ŝorĉistinoj komenciĝas en la 15a jarcento ( 1487 ), kiam du fratoj - dominikanoj, teologiaj profesoroj, protektataj de Papo Inocento VIIIa - Henriko Institoris kaj Jakobo Sprenger, publikigis " Malleus maleficarum " ( Martelo kontraŭ sorĉistinoj ), unu el la plej nigraj libroj de la homaro.

Tiu okaze la unuan fojon inaŭgurigis teologiaj konceptoj laŭ kiuj sorĉistinoj arigas en grupoj kaj kontraktigintaj kun la diablo, fariĝas posedantoj de supernaturaj kapablecoj. Havanta tre grandan kaj eĉ minacantan influon, tiu verko atingis preskaŭ leĝodonan aŭtoritaton.

Samtempe menciinda estas ankaŭ " La leĝaro pri juĝaj punprocedoj kontraŭ sorĉistinoj ", tiel nomata " Ferdinanda ", eldonita en la jaro 1656 de la reĝo Ferdinando IIIa. Bedaŭrinde ankaŭ tiu verko baziĝis nur sur heredita tradicia superstico.

Post tiuspecaj inkviziciaj dokumentoj, entenantaj instrukciojn pri la malkovro kaj punado de sorĉistinoj, komenĝis kruelaj fantomaj ĉasadoj, torturoj kaj brulmortigoj sur la ekzekutstiparoj. Ĉi tie indas akcenti ke estus granda juĝdeflankiga opinio, enviĝi tiujn amasajn procedojn nur en la malluman mezepokon - sian lokon iuj trovis eĉ post la 18a jc.

Plenajn kvar jarcentojn tra la tuta Eŭropo bruladis hontinda nombro de brulstiparoj, el kiuj la lasta estis bruligita en Valencio en la jaro 1826. Ŝajnas ke ties numero atingis kelkajn centmilojn.

Nur en Kroatio, tiutempe estis mortbruligitaj ĉirkaŭ sep miloj da virinoj, akuzitaj pro sorĉado. Zagreb kun siaj ducent viktimoj same kiel la tuta Eŭropo, travivadis tiutempe teruran epokon en kiu la pozicio de tiamaj virinoj sin trovis malsupre de ĉiu sovaĝa animalo. Estas bedaŭrinde ankaŭ la sciencula saĝeco, rilate tiujn virinojn, same publike subtenadis kaj eĉ mallaŭdegite firmigis tiun postrestintecan supersticon.

Kie do troviĝas la apero de sorĉistinoj? Laŭ ĉiuj asertoj ( Jules Michelet 1 ), sendube en la epokoj de senespero - en historiaj tempoj kiujn karakterizis magioj, sorĉoj kaj torturadoj.

Plej ofte sufiĉis iu sola virina ĵaluzo, aŭ eble vira avideco por senpera verdikto, kiu helpe de la mistera vorto " sorĉistino " tuj pruvis ies kulpecon. En zagrebaj historiaj dokumentoj estis trovitaj tre oftaj malveraj akuzoj, laŭ kiuj la akuzita virino estiĝis senkomplete juĝata kaj stiparbruligita.

Bonŝance en la 18a jc komenciĝis epoko de klerismo, kaj fine de 1758 la imperiestrino Maria Tereza, plej ofte instigata de sia filo Jozefo II, nuligis tiujn neakcepteblajn leĝojn. Tiamaniere la neperceptebla obskureco iom post iom laŭgrade vigligis la ekscion, inciante la lukton kontraŭ malluma superstico.

En tiu agado mirindan influon transprenis ankaŭ "Remetanoj", zagreba progresema junularo, kiu spirite gvidata de sia heroino - la konteso Nera Kegleviĉ, senmezure kontribuis al la verko kontraŭ tiu albonago.

Tiuj nemalgrandaj sukcesoj sendube instigis irebligi pli helan

vojon al la nuntempa feminismo, kaj plialtigi la perditan honoron de la tiamaj virinoj.

Je tiaj cirkonstancoj, en la zagreba vivo aperis rimarkinda figuro, kies akra plumo scipovis brilmaniere batali kontraŭ tiu malvirto. Aperis Maria Juriĉ - Zagorka ( 1873 - 1957 ), talentita verkistino kiu maljuste supremata sur la marĝenoj de la kroata literaturo, dank'al sia vigla lerteco, merite retenis sian rekonatan ĵurnalistan postenon. En tia ofico ŝi plensukcese batalis ankaŭ kontraŭ la okulfrapa fremda literatura influo kiu konstante blindigis la hejmajn lingvon kaj kulturon.

Estante virino, kaj vivanta en la tempoj en kiuj ilian egalrajtecon neniu povis imagi, Zagorka restis ĉiam nekomprenata kaj nerekonita. Escepton faris la zagreba gazeto " Obzor " en kiu ŝi kvankam virino, estis povinta kiel - tiel labori en ĝia redakcejo.

Rimarkita kaj protektata de la ĉefepiskopo J. J. Strossmayer, samkiel de aliaj tiamaj gravuloj, inter kiuj ankaŭ la plej konata historiisto ( Ivša Tkalčić k.a. ), ŝi kapablis ekkoni la tutan zagreban historion. Prilaborinte tiun historion preskaŭ tage kaj nokte, Zagorka sukcesis samtempe verki multnombrajn, tre interesajn historiajn romanojn.

Tiel aperis ankaŭ ĉi prezentata " La sorĉistino de Griĉ " - unu el siaj plej konataj romanoj, traktanta la plej obskuran parton de la zagreba historio. Krome nepras mencii ke la temo de tiu romano baziĝas sur vera historia rakonto ĉerpita el la juĉado kontraŭ la ĉasta zagreba bakistino Barica Cindrek, nomata Jurkoviĉ. Laŭ la dokumentoj trovitaj en la juĝa arkivo, tiu escepte bela vidvino, kies beleco defuis aron da supersticiaj ĵaluzoj, estiĝis en februaro 1743 kaptita kaj senpruve akuzita kiel sorĉistino.

Ŝia proceso fariĝis unu el la plej interesaj procesoj en la Zagreba historio - precipe pro tio ĉar tiu proceso malkovris multnombrajn gravulojn kaj eminentajn burĝojn, suspektataj je malĉastaj orgiaj kaj seksaj diboĉoj alkiutimigintaj en Griĉaj sorĉkunvenoj.

Pri multaj juĝaj procesoj ekzistas veraj historiaj dokumentoj, kaj veraj juĝaj protokoloj kiujn la aŭtorino ĝisfunde pristudadis. Precipe bone ŝi ekkonis preskaŭ ĉiujn mallumajn luktojn okazintaj en la kortegoj de Vieno kaj Budapeŝto, kien Strossmayer ŝin ofte sendadis.

Sendube certigas ke la aŭtorino uzis sian " licentia poetica ", sed la historio firme asertas ĉiujn persekutadojn kaj eĉ la veran ekziston de la tiel nomataj diablaj rondoj - sorĉkunvenoj.

Trovita estis ankaŭ riĉa bibliografio de privataj leteroj, propraj de la eksa banusino - la grafino Sermage - Rauch. Ekzistas eĉ pruvoj pri la vivo de Maria Kegleviĉ - Malatinski ( en la romano: Nera ), Sigismundo grafo Vojkoviĉ - Vojkffy ( en la romano: Siniŝa ), Suzana nobelino Ratkay, k.a.

Epoko de la agado en romano " La sorĉistino de Griĉ " okazis ĉirkau la 1750-a.

Ĉiuj romanoj de Maria Juriĉ - Zagorka ĝisvivis multnombrajn eldonojn, kiuj senĉese ekscitas vivan intereson ĉe hodiaŭaj legantoj.

Laŭ ĝisnunaj informoj, la romano " La sorĉistino de Griĉ " ne estas ankoraŭ tradukita en iun ajn alian lingvon. Tie - ĉi prezentata en Esperanto, ĝi ne prezentas lauvortan tradukon pro sia treege ampleksa originalo, sed kiel vera kaj nur mallongigita rerakonto, ĝi retenas sian sensanĝan enhavon.

V.L.

1  
franca historiisto ( 1798 - 1874 ), profesoro de L'Ecole normale kaj Sorbono, kiu krom laŭ siaj filozofiaj verkoj rimarkinde influis ĉiun tiutempan opinion.

( dauriĝota )



## PEDAGOGIA PAĜO

### METODIKO

#### KIEL INSTRUI POR NE PERDI KURSANOJN

Mila van der HORST - KOLINSKA

La legantoj certe aŭdis pri la fenomeno, ke dum kursoj, gvidataj laŭ Cseh - metodo, malofte iu lernanto forlasas ĝin, sed, kontraŭe, tiaj kursoj ofte finiĝas kun pli da kursanoj ol komenciĝis, kompreneble se gvidis ĝin bona Cseh - instruisto.

Ĝis nun oni ne analizis tiun fenomenon, kvankam neniu alia instrumetodo atingis tian rezulton. Miaopinie tiu fenomeno de Cseh - metodo fontas ĉefe el jenaj bazaj principoj de la metodo:

- fremdlanda instruisto, kiu kapablas instrui al plurnaciaj lernantoj ( por krei naturajn kondiĉojn komuniki el lernata lingvo )

- ne - uzo de lernolibro kaj nacia lingvo ( por lerni pensi en lernata lingvo )

- konversacia formo ( por uzi parole la lingvon ekde la unua leciono )

- komprenigado de vortoj kaj gramatikaj reguloj per prezentado de objektoj, per gestoj, konvenaj ekzemploj kaj ekzercoj ( por pli facile kompreni la funkciadon de la lingvo )

- sekvo de la didaktika regulo gvidi la lernantojn de konaĵo al nekonaja, kiun Cseh nomis " gimnastiko por la cerbo ", per uzo de jam konataj vortoj por skribi la nekonatan ( ekzemploj troviĝas en la Konversacia Vortareto )

- sekvo de la metodikaj paŝoj ( necesaj por ĈIU instrumetodo):

a) prezento de nova materialo

b) praktikado kun eventuala korektado

c) ripetado pere de aplikado

El la ĵus menciitaj principoj oni povas konkludi ke sukceso aŭ malsukceso ĉefe dependas de la kapabloj de la instruisto. Bonan instruiston oni bezonas por ĉiu - speca kurso, kompreneble. Cseh diris: " Instruisto kapablas sukcesigi la plej malbonan metodon kaj detruu la plej bonan ". Bona Cseh - instruisto estas trejnata instrui la lingvon ĉefe al plurlingvaj lernantoj. Ŝi / li devas

- ŝati instru - laboron kaj facile kontakti kursanojn

- bone koni, kompreni kaj uzi parole Esperanton

- esti konviktita pri la valoro de Esperanto

- kompreni la metodon kaj fidi en ties efiko

- esti kapabla kapti atenton kaj teni ĝin dum la tuta renkontiĝo

- esti aktiva, sprita, eĉ aktoreca, sed precipe natura kaj pacienca

- esti kapabla krei amikan etoson, vigligi kursanojn, vekti intereson, racie prezenti la lingvon, montri la praktikajn valorojn de Esperanto, adaptiĝi al ofte ŝanĝigantaj kaj ne antaŭvideblaj kondiĉoj kaj situacioj

- esti inventema, konsekvenca kaj akurata, sed ne enuiga

- esti tre bone preparita por ĉiu renkontiĝo

- havi bonan kaj klaran prononcadon

- ne paroli mem tro multe, sed gvidi konversacion, uzante KI - demandojn kaj evidante ĈU - demandojn.

Traleĝinte tiujn postulojn oni povas dubi ĉu tia instruisto ekzistas. Parte dubantoj pravas, ĉar mi ja prezentis idealan Cseh - instruiston kaj mi scias ke idealoj ne ekzistas, tamen oni devas konscii al kio strebi kaj kion provi atingi!

Manko de devoj karakterizas la metodon: ĉio okazu libervole; la kursanoj ja venas ankaŭ libervole al la kurso! La etoso estu agrable leĝera, do alloga por reveni ( sen lerneja disciplino ). Tamen... estas

tasko de instruisto gvidi la tuton tiel, ke la kursanoj post ĉiu renkontiĝo tuj spertu utilon kaj havu la senton ke ili lernis ion novan. Manko de tiu sento kaŭzas pardon de kursanoj!

Intence en la libro Baza Cseh - kurso, kun metodikaj konsiloj por kursgvidantoj, la instru - materialo ne estas dividita en lecionojn, sed en punktojn kaj temojn, por ke la instruisto povu facile adapti ĝin al la nivelo de kursanoj kaj uzi ĝin laŭ bezono kaj ne lau devo ( al kio devigas libro, dividita en lecionoj ).

Resume mi citas la eldiron de Andreo Cseh ke " kurso fiaskas ne pro malbonaj lernantoj sed pro nebona instruanto ". Pri tio oni klopodas edukcele konsciigi la Esperanto - instruantojn dum Cseh - seminarioj, por ke ili estonte ne perdu kursanoj, ĉar tiuj perditoj jam ne plu revenos kaj ofte fariĝos kontraŭloj de Esperanto. Kaj ĝuste tion ni nepre evitu!

Ĉi supra artikolo estas prenita de la Internacia Pedagogia Revuo, organo de ILEI, nr. 1/92.

## ETULA ANGULO

### NI EN BUDAPEŝTO

Ĉu vi iam vizitis Budapeŝton?

Se ne, vi pripensu la viziton dum la tralegado de ĉi tiu artikoleto pri nia vizito.

Meze de la ĉijara majo ni esperantistoj el zagrebaj bazlernejoj ekskursis al Budapeŝto. Tamen, tuj ĉe la komenco ni devas diri al vi, ke ne temis pri la klasika ekskurso ( eniri buson, tutajn tagojn vagadi rigardante belaĵojn de la urbo, aŭ simile ).

Do, jen ĉio koncize.

Ni veturis per la trajno ( momente la plej malmultekosta vojaĝebleco ). Unua bela avantaĝo estis kelkhora vojaĝo apud la lago, kiu ŝajnas senlima kiel la maro. Dua, tuj ĉe la stacidomo renkonti esperantistojn: malgranda Matejo kaj la patro, kaj fine tria, veturi per la subtera fervojo sub la rivero Danubo.

Do, post tiujn unuajn belajn punktojn de nia vojaĝo, sekvis multaj. Ni nur rapide nombros ilin: duontaga ekskurso tra malnova parto de la urbo kun tre afablaj esperantistoj kiuj ĉiĉeronis nin, posttagmeza vizito al la besto-gardeno kaj la amuzparko, vizito al la Esperanto - muzeo de sinjoro Fajsz, vesperaj promenoj apud kaj perŝipa veturo tra Danubo.

Nun neordinara parto aŭ kialo por ne nomigi nian eksterdomigon ekskurso.

Ni du foje prezentis la programojn, en kroata bazlernejo - kroatlunge, kaj en Esperejo - esperante. Nun vi komprenas, ni oni povas diri oficiale - gastigis en Budapeŝto. Pri la impresoj bonvolu kontakti publikon mem. Ni ne forgesos la internacian rondon en Esperejo, la plej verŝajne same ili nin!

Do, ni provis mallonge prezenti, ke ne ĉiu vojaĝo estas ekskurso, inverse ni ankoraŭ ne scias.

Kaj jen la lastaj vortoj, se tute hazarde vi decidis viziti la hungaran ĉefurbon, eble estus bone ke vi kontaktu nin, ĉar ni dum kvin tagojn sukcesis malkovri multajn sekretojn, kaj multaj inter ni povus esti bonaj ĉiĉeronoj. Ni certigas al vi, vi vidos multajn interesajn, sed tamen ni donos iom da libera tempo, ke same vi trovu ion novan, por ke poste vi povus esti ĉiĉerono al iu via amiko.

Ĝis en Budapeŝto aŭ eble iu alia eŭropa urbo, oni neniam scias.

Marko Kordiŝ, 10 - jara

## JUNULARA MONDO

Estimataj,

Anoj de la Kroata Esperantista Unuiĝo fondis kelkajn faksekciojn - kolektivajn membrojn de la Unuiĝo mem.

Ilian atenton en la Statuto ni bone eluzis. Do, temas pri la aparta sekcio en kiu aŭtomate estas membroj de KEU malpliagaj ol 30 jaroj. Feliĉe, ni povas informi vin, ke ni nombras eĉ 57 ( legu kvindek sep ). Por la komenco, eĉ pli ol sufiĉas, tamen ni deziras esti pli nombrajn, sed pri tio ni pli serioze okupiĝos nin de la aŭtuno.

Certan parton de junaj membroj ni sukcesis aktivigi laŭ kelkajn grupetojn. Ĝis nun la plej aktivaj estas: literatura, muzika, sporta. Do oni verkas poemojn plej parte, sed same muzikas. Muzika grupo nombras ses junulojn kelkajn gitarojn, kaj iom da bonaj voĉoj. Nun oni tradukas kelkajn niajn kantojn ( jes vi bone tralegis ) al Esperanto kaj ni esperas rekonti vin dum iu E - renkontiĝo. Vi povus juĝi niajn muzikajn eblecojn, sed same poste inviti nin. Pri la sporto, ni povas diri, ke aŭtune ni organizos sportajn konkursojn por la junaj esperantistoj.

Ni same pensas pri la edukado. Baldaŭ oni komencos gvidi kursojn laŭ la nova metodo en Kroatio " Gerda malaperis...". Ni eluzas ĉi tie eblecon, kaj dankas al sinjoro Claude Piron kaj Germana Esperanto - Junularo por la helpo ( ili scias kia ).

Kaj nun sekvas malgranda priskribo de nia vizito al Szombathely, Hungario, komence de majo ĉ.j.

### INTERNACIA JUNULARA RENKONTO

Okaze de unumaja festo tago kaj semajnfino ni ok ( kurs - gvidantino, kvin junuloj kaj du gitaroj ) partoprenis Internacian junularan renkonton en Szombathely, hungara urbo ĉe la aŭstra landlimo. Nia grupo estis dua laŭ la nombro, post hungaroj. Ni devas mencii, ke ni akiris multajn sukcesojn en la sportaj ludoj, muzikado, cerbado ( serĉado de la manĝejon en iu fora strato ), kaj kelkaj en E - konversacio. Ni eĉ sukcesis enlerni kelkajn hungarajn vortojn.

Por ni ĉi tiu renkontiĝo estas tre grava, ĉar kelkaj inter ni havis unuan eblecon renkonti eksterlandajn esperantistojn. Post tiu praktika uzo de la lingvo, ĝi por ni vere multon signifas.

Se vi deziras renkonti nin, simple sendu al ni la informojn.

KZ& Darko Jukica



## AMUZAĴOJ

Konkursu kaj gajnu premion okaze de la reeldonado de la " Kroata Esperantisto ".

Unua numero aperis en la jaro:

- a) 1887
- b) 1909
- c) 1992

Unua redaktoro de la gazeto estis:

- a) Mavro Špicer
- b) Ivo Lapenna
- c) Danica Bedeković

La gazeto aperis en:


- a) Zagreb
- b) Ŝibenik
- c) Osijek

Nuna eldonanto de la gazeto estas:

- a) Unuiĝo de kroataj esperantistoj
- b) Zagreba Esperanto - Ligo
- c) Kroata Esperantista Unuiĝo

Viajn respondojn sendu al la adreso de Kroata Esperantista Unuiĝo, Zagreb, Trg burze 2 ĝis la 15-a de septembro 1992.

**AUTORO: NINOSLAV KUNC**



## KROATIO



Respubliko Kroatio estas membro de OUN de la 22-a de majo 1992  
KROATIO (mallongigo oficiala estas HR au HRV, neoficiala CRO)  
KROATIO estas lando de milducent insuloj kaj multaj etaj lagoj  
KROATIO estas mezeŭropa lando

ŜTATA FORMO: Respubliko

POPOLO: Kroatoj 78,1%, Serboj 12,2% kaj aliaj (slavaj muzulmanoj, hungaroj, italoj, k.a.) laŭ la popolnombro el la jaro 1991 antaŭ la milito

RELIGIO: tri kvaronoj katolika (laŭ la samjara popolnombro)

ĈEFURBO: Zagreb 930.550 da loĝantoj

LOĜANTARO: 4.784.265

AREO: 56.538 km<sup>2</sup>

LOĜANTARDENSECO: 85 log./km<sup>2</sup>

LINGVO: kroata

ALFABETO: latina (en pasinteco ekzistis ankoraŭ du naciaj alfabetoj: glagoljica (speco de kroata cirila skribo) kaj bosanĉica (speco de kroata araba skribo))

BLAZONO: historiaj dudek kvin ruĝaj kaj arĝentaj (blanka) kvadratoj kronigitaj kun kvin blazonoj de opaj kroataj regionoj

FLAGO: trikolora - ruĝa - blanka blua, kaj en la centro situas ŝtata blazono

KONSTITUCIO: publikigita la 22-an de decembro 1990

PREZIDENTO: d-ro Franjo Tuđman

PARLAMENTPREZIDANTO: d-ro Žarko Domljan

REGISTARPREZIDANTO: d-ro Franjo Gregurić

LEĜFARANTA ORGANO: Sabor (kroata parlamento)

MONERO: kroata dinaro

MONBILETO: Figuro sur la monbileto: Ruđer Bošković (Rogerius Boscovich 1711 - 1787), mondkonata scienculo kaj filozofo, kroato el Dubrovnik

GEOGRAFIO: Kroatio konsistas el ebenaĵo en la regiono Slavonija, montaroj (Dinaridi) en la centra Kroatio kaj regiono Lika kaj apudmara regiono de Istra ĝis

Dalmacija.

Maro: Jadransko more (Adriatika Maro)

Longeco de la marbordo: 5.790 km

Insuloj: 1.185 areo: 3.300 km<sup>2</sup>

Riveroj: Dunav, Sava, Drava, Kupa, Neretva, Una, Krapina, Zrmanja

KLIMATO: kontinentala kaj mediteranea

EKONOMIO: Kroatio havas multflankan ekonomistrukturon. Agrikulturaj produktaĵoj: tritiko, maizo, vinberoj, sunfloro, sojo, sukurbeto, terpomo, pomoj, mandarinoj, figoj, olivoj, k.a. Industriaj produktaĵoj: ŝipkontraŭaĵo, naftindustrio, kemia-, metal-, elektro-, lignoindustrio, k.a.

HISTORIO: Kroata historio originas el la plej malnova tempo persia (Laŭ la ĉarto de reĝo Dario la 1-a) kaj post fiasko de persia armeo ĉe Maratona kampo far de Grekoj, kroatoj perdis ligan kun abelpatrina nacio kaj lando, kaj post invito Kroatoj venis el tm. Blanka Kroatio al Ruĝa nuna Kroatio en la sepa jarcento en Suda Eŭropo de Adriatika maro ĝis rivero Drava.

- 925-a jaro Kroatio igis reĝlando (reĝo Tomislav)

- 1102-a jaro hungara reĝo Kolomano estis ankaŭ kroata reĝo

- 1526/1527-aj jaroj Kroata parlamento (Hrvatski Sabor) elektis sian reĝon el dinastio Habsburg

- 1918-a jaro Kroatio unuiĝis kun Serbio kaj Slovenio

- 1945-a jaro Kroatio ekestis unu de la ses respublikoj de la Nova Jugoslavio

- 1991-a jaro la 25-an de junio Kroatio estis proklamita kiel sendependa ŝtato (La Rezolucio de Kroata Parlamento)

TURISMO: speciale somera apudmara mondkonata turismo, belecoj de Plitvice - lagoj kaj multaj historiaj vidindaĵoj kaj kasteloj

Turismaj provincoj: Istrio kaj Dalmatio

Konataj turismaj lokoj: Rovinj, Opatija, Crikvenica, Biograd, Makarska, Dubrovnik